



Pos-Amiko

Somero, numero 33

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. Estrarkunsido inter-
1. rompita de trolo
- Retaj flugoj
2. Konferencoj senutilaj
2. UEA volas kunvenigi
- komitaton
3. Skandalo ĉe bambo
- 3 Nova merkatumeblo
- por verdaj vestaĵoj
- 3 NASK sen littukoj
4. Nova AKSO preskaŭ
- pretas
4. NEJ-Novaĵoj
5. Horoskopoj
5. Kara Koko
6. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps.esperanto->

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

Estrarkunsido interrompita de rusa trolo

Kunsido de la estraro de UEA en Roterdamo estis ĝene interrompita de iu rusa trolo, kiu subite eniris la ĉambron kaj komencis diri hazardajn ruslingvaj fivortojn. La nekonata persono ne parolis Esperanton, kaj ne respondis al diverslingvaj petoj foriri el la privata kunsidejo. Poste li komencis montri pentritajn kacojn en sia komputilekrano, kiun li tenis en la mano. Ĉar neniu en la estraro sciis, kiu havas sufiĉajn rajtojn en la ĉambro, la trolo restis en la ĉambro dum duona horo kaj ĝenis en diversaj manieroj. La estraranoj daŭrigis la kunsidon skribe (sur paperoj), kaj tiel ignorita la trolo finfine forlasis la ĉambron.

Poste evidentiĝis, ke la adreso de la kunsidejo (Nieuwe Binnenweg 176) estas trovebla en la ĉefpaĝo de UEA, do la estraranoj povis nur kulpigi sin mem pri la okazintaĵo.

Flugkompanioj nun ofertas retajn flugojn

Pro diversaj kvarantenoj en la mondo multaj okazaĵoj en la pasintaj monatoj ne povis okazi, aŭ nur en reta formo. Unu el la plej trafitaj ekzemploj de tio estas flugoj. Apenaŭ iu lastatempe povis sperti fruegan vekiĝon, maltrankvilan vojaĝon al flughaveno, hontigajn valizkontrolojn, horojn da atendado, dorsrompantajn seĝojn kaj nefidindajn taksiojn. Sed nun Star Alliance, kunlaboro de grandaj flugkompanioj, volas ŝanĝi tion.

“Ni certas, ke tiu ĉi sperto, tiom ligita kun ferioj, mankas al multaj homoj.” – deklaras ĝia ĉefo J. Goh. “Ni ankaŭ invitas al ĉiuj partoprenontoj de IJK, VK kaj ĉiuj aliaj retaj kongresoj tuj rezervi retan flugon al la kongreso ĉe unu el niaj membrokompanioj. Hastu, antaŭ la sidlokoj ĉe fenestro forvendiĝos!”

BEMI jam faris aliajn planojn, kaj intencas per reta biciklokaravano atingi la ĉi-jaran IJK-on.

Konferencoj pruviĝas senutilaj

Neplanita tutmonda eksperimento en la komerca kaj scienca mondoj pravas tion, kion iuj homoj jam longe supozis. En la dua kvarono de 2020 la produktiveco de nek komercistoj nek sciencistoj mezurable falis, kvankam en tiu periodo povis okazi neniuj internaciaj konferencoj. Ĉu do estas malvero, ke konferencoj gravas por povi fari sciencon kaj komercon? Ĉu tiom da vojaĝado estis nur amuziĝo, pagita de aliaj, kun bona preteksto? Elstaraj sciencistoj jam ofertis fari tutmondan esploron por malkovri la veron.

Volontuloj serĉataj

La Akademio Internacia de la Sciencoj serĉas volontulojn por eksperimento pri ligo inter internacia vojaĝado kaj malŝparado de mono. Interesiĝantoj kontaktu doktoron M. Nujo.

UEA volas kunvenigi komitaton

La Universala Kongreso 2020 en Kanado estas unu el la viktimoj de vojaĝlimigoj. Kuniĝo de pli ol mil personoj en unu kongresejo estas tute neimagebla en tiu ĉi somero. La estraro de UEA provas tamen organizi iom malpli grandan kunvenon en aŭgusto: la asocio konsideras rezervi lokojn en krozvojaĝo por okazigo de la Komitatkunsido 2020. Mi demandis klarigojn al la Ĝenerala Sekretario de UEA.

Poso: “Ĉu estas malfacile organizi tiun kunvenon?”

Aleks Kadar: “Tute ne. Ial krozvojaĝoj estas tre malplenaj nun, do ni sukcesis negoci tre bonan prezon. Krome, mi pensas ke la averaĝa komitatano sentos sin tre bonvena en tiu medio.”

P: “Ĉu ne ekzistas iuj sanriskoj?”

A.K.: “Tio povus esti, sed ni estraranoj ne ĉeestos. Ni scias, ke por multaj el la pli fidelaj komitatanoj reta kunsido ne estas konsiderinda ebleco, kaj ĝuste ilin ni invitas kunumi en reciproka proksimeco. Tiel povos okazi pli glataj kunsidoj, ĉefe en la estonteco.”

Skandalo dum bambumado

Dum bambojesio en la reta IJK kreiĝis skandalo, kiam iu maldeculo senkonsente inspektis la pakaĵojn de ĉiuj ĉeestantoj kaj ankaŭ skanis diversajn pordojn. Multaj partoprenantoj ne ŝatis tiun neatenditan intimecon, eĉ pli kiam li ankaŭ insiste petis IP-adresojn de iuj virinoj. Fine la organiza teamo decidis fermi la dancejon per privata ŝlosilo por eviti pliajn skandalojn.

Nova merkatumeblo por verdaj vestaĵoj

La librovendistoj de la Esperanto-mondo, spertaj pri la vendado de pingloj, ĉemizoj kaj foje eĉ libroj, nun prepariĝas por plej bone eluzi novan surfacon, sur kiu oni povas printi malbonajn vortŝercojn en Esperanto: la buŝmaskoj.

Kvankam ĝi havas malpli da surfaco ol ĉemizo, tiu surfaco estas eĉ pli videbla, kaj neniam kovrita de aliaj vestaĵoj. Pro tio ĝi estas taŭga ilo por trudi viajn idealojn al ĉirkaŭaĵo. Atendu do baldaŭ vizaĝojn kovritajn per sloganoj kiel ‘disvastigu Esperanton, ne viruson’ kaj “mi longe penis”.

Manko de littukoj en NASK

Multaj partoprenantoj de NASK spertis malkomfortajn noktojn, kiam la organizo ne provizis littukojn por ili. Kontraŭ la alta prezo de 75 dolaroj multaj atendis almenaŭ riceviton, sed la littukaro evidentiĝis esti tute memserva respondeco, kvankam la retpaĝo nenion skribis pri tiu temo.

La organiza teamo defendas sin dirante, ke “ni atendas almenaŭ bazan mondokomprenon de niaj partoprenantoj” kaj ke “loĝistike estus malfacile liveri pakaĵon da littukoj al ĉiuj retaj partoprenantoj, kelkaj eĉ en aliaj mondopartoj”.

Nova AKSO preskaŭ pretas

La kreado de la Aŭtoritata Kompleta Sistemo Organiza eniras sian lastan fazon. La sistemo celas anstataŭigi la membrodatumbazon de TEJO kaj UEA, poste iliajn nunajn retpaĝojn, kaj fine plejparton de la tutaj asocioj. Tiu aŭtomatigo ne nur plirapidigos kaj plibonigos la servojn al membroj, ĝi ankaŭ signife malplialtigos la riskon bezoni persone interagi kun oficisto en Roterdamo, kiel nun ofte necesas por mendi kongresajn servojn, aĉeti libron aŭ ekscii la staton de uea-pago farita antaŭ du monatoj.

En la sekva fazo la sistemo ankaŭ komencas forpreni respondecojn de estraranoj. Pro pli bona datumsuperrigardo la kreado de financaj raportoj, jarraportoj kaj buĝetoj iros preskaŭ tute aŭtomate. La sistemo ankaŭ povos al nepagintaj sekcioj sendi memorigojn kaj poste armitajn dronojn. Post la sukceso de tio la sistemkreanto M. N. ankaŭ volas aldoni modulon, kiu ĉe la aŭtomata kreo de gazetara komuniko aŭ membroraporto tuj kreas la akompanan artikolon de Libera Folio.

Fine per maŝinlernado AKSO iam povos plejparte aŭtomatigi la voĉdonadon en komitatoj, sciante ĉies plej verŝajnajn preferojn. Tiel restos laŭeble multe da tempo por gramatikaj diskutoj en la kunsidoj.

NEJ-Novajoj!

IJK-partoprenantoj, memoru:

- Partoprenu en Mondovizio, sendu vian filmeton ĝis la 15-a de julio 14:00UTC.
- Sendu vian foton por la grupfoto ĝis la 16-a de julio 20:00UTC.
- Instalumu Telegramon kaj aliĝu al [ijk.telegramo.org](https://www.ijk.telegramo.org).

Membrokunsido

La sekva membrokunsido de NEJ okazos je dimanĉo la 1-a de novembro, en Ry (DK) dum la Klaĉ-Kunveno Post-Somera. Reta partopreno en tiu ĉi membrokunsido eblas, membroj ricevos detalan informon pri tio en la aŭtuno.

Kara koko...

“Kio alvenis unue, ĉu vi aŭ ovo?”

Kara homo,

En la historio de la mondo estis vere multaj ovoj. Pli ol eblas kalkuli. Pli ol cent kvindek certe. Sed ili ĉiuj estis ordinaraj ovoj, neniel rimarkindaj aŭ elstaraj. Ankaŭ estis multaj kokoj, sed nur unu el ili ĝis nun estis Koko Poso. Se iam estus ovo de mi (kaj mi ankoraŭ ne renkontis la ĝustan kokinon), ĝi certe estus eksterordinara ovo, sed kompreneble ĝi tiam alvenus post mi.

Poso

Ĉu vi havas gravan demandon por Koko Poso? Skribu al kkps.klackunveno@gmail.com!

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Se mankas al vi littukoj, dormu sub tri tavoloj da necesejpapero.

Taŭro: Neniu vidas, kies bildon vi rigardas, do libere okulumu dum kunsido.

Ĝemeloj: Vi tiom ŝparis pri flugoj kaj pantalonoj, elspezu ĝin por KKPS.

Kankro: Vi estas tro okupita pri Minecraft, kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Leono: Ĉu vi jam finis kalkuli la ŝtonojn en via muro?

Virgulino: Pro interretproblemoj vi daŭre restos.

Pesilo: La plej taŭga bildo sur buŝmasko kompreneble estas buŝo.

Skorpio: La plej facila maniero por atingi sukcesos estas malaltigi atendojn.

Karina O: Ĉiam en iu horzono estas tempo por kafopaŭzo.

Sagitario: Ĉi-somere prenu retan flugon kaj esploru someren.nl.

Kaprikorno: Vi akcidente iĝos programero de la Virtuala Kongreso.

Akvisto: Kiu el viaj kvarantenaj hobiaj sufiĉe gravas por posta vivo?

Fiŝoj: Mondvojaĝu per manĝomendoj (kaj kunmiksi ilin).

Vizitu Poson dum KKPS!

Koko Poso solas en kvaranteno en Danio. Ĉu vi volas viziti lin apud la ĉiela monto en Ravnsø ĉe Ry en novembro? Partoprenu la unuan renkontiĝon post la kvarantenoj!

De la 31-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro 2020 okazos la 9-a KKPS. Ĉi-jare ni festos halovenon en ujutna nederlanda etoso en arbaro meze de nenie

en Ravnsø ĉe Ry en Danio. Ne paniku tamen, la loko estas bone atingebla per trajno per la stacio Skanderborg.



Mi ne ŝatas la grizan veteron ĉi tie.



Jam eklernu elparoli Ravnsøhytten

Krom la nederlandaj kutimaĵoj kiel duontaga ekskurso, halovena balo kaj noktaj manĝoj estos ankaŭ danaj tradicioj kiel gløgg, æbleskiver kaj biero kontraŭ malpli ol eŭro ($\approx 7,46$ kr).

Ne estu koko, venu al KKPS!

Aliĝu jam nun ĉe <http://kkps.esperanto-jongeren.nl/2020eo:aligilo>